

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2010

Vendredon la 30an de aprilo

58a jaro

Kalendaro

Lundon la 3an de majo – mandag (semajno uke 18).

Ni kune planos kaj verkos artikolojn pri Oslo por Vikipedio (reta enciklopedio, kiun ĉiuj uzantoj povas libere verki kaj redakti, vidu ankaŭ p. 2). La jama artikolo (eo.wikipedia.org/wiki/Oslo) estas tre mankhava. Ni havas ankaŭ broŝuron, sed ĝi eldoniĝis en 1952!

Sammen planlegger vi og skriver artikler om Oslo for esperanto-utgaven av Wikipedia (leksikon på Internett, som alle brukere fritt kan være med på å skrive og redigere – se også s.2). Det står lite der om Oslo fra før. Vi har også en brosjyre, men den er fra 1952!

Lundon la 7an de junio – mandag (semajno uke 23).

Ni daŭrigos nian verkadon de artikoloj por Vikipedio. Kunportu vian proponon pri temo kiu ĝis nun mankas en la Esperanto-parto. Se vi trovos jaman artikolon en alia lingvo, vi povos traduki ĝin. Aŭ vi povos verk(et)i ion novan. En la kunveno ni prijuĝos kaj pluskribos.

Vi fortsetter å skrive for Wikipedia. Ta med ditt forslag til en artikkel som det ikke står noe om på esperanto fra før. Hvis du finner en artikkel på et annet språk, kan du oversette den. Eller du kan skrive noe nytt. På møtet skal vi forbedre og utfylle.

Iam post la 20a de junio – en gang etter 20 juni (en semajno uke 25).

Ni atendas gaston el Malio en okcidenta Afriko: Drissa Diakite, kiu planas veni kun siaj du gefiloj (11- kaj 14-jara) por turismumi en Norvegio, kaj precipe en Oslo. Atentu retroŝtajn mesaĝojn aŭ informiĝu ĉe nia oficejo.

Vi venter en gjest fra Mali i Vest-Afrika: Drissa Diakite, som planlegger å komme med sin sønn og datter (hhv 11 og 14 år) for å feriere i Norge, og da særlig i Oslo. Følg med på e-posten eller ta kontakt med kontoret.

Vikipedio

Vikipedio estas reta enciklopedio, kiun ĉiuj uzantoj povas libere redakti kaj pluverki. Vikipedio datiĝas de januaro 2001, kaj ĝi nun sume havas 1,5 milionojn da artikoloj, en pli ol 150 lingvoj. Ĝin kreas volontuloj, kiuj kontribuas, ĝisdatigas, kaj revizias artikolojn kunlabore.

La esperantlingva Vikipedio kreskas ĉefe per tradukoj kiujn faras esperantistoj el alilingvaj Vikipedioj – aŭ verkas mem.

Ĉar temas pri volontula, nepagata laboro, la kvalito kaj amplekso ja multe varias. Sed ankaŭ la nacilingvaj versioj ne estas perfektaj. Ni strebu, ke la Esperanto-versio estu, se ne la plej kompleta kaj ampleksa, almenaŭ inter la plej kompletaj, ampleksaj kaj kompreneblaj, ĉefe fidindaj.

Almenaŭ kvante la esperantlingva Vikipedio sukcese konkuras kun pluraj naciaj Vikipedioj: Antaŭ monato Esperanto staris je la 22a loko inter 271 lingvoj kaj inter la 31 lingvoj, kiuj havas pli ol 100 000 artikolojn.

Nun estas pli ol 128 000 artikoloj en Esperanto kaj la nombro daŭre kreskas.

Wikipedia er et leksikon på Internett, som alle som bruker det, fritt kan redigere og utvide. Wikipedia kom i gang i januar 2001, og nå har den i alt 1,5 millioner artikler, på over 150 språk. Den skapes av frivillige, som bidrar, oppdaterer og reviderer artiklene i samarbeid.

Esperanto-utgaven vokser hovedsakelig med oversettelser fra artikler på andre språk – eller som folk selv forfatter.

Fordi dette er et frivillig, ubetalt arbeid, er kvaliteten og omfanget svært forskjellig. Men heller ikke versjonene på andre språk er uten feil. La oss satse på at esperantoversjonen blir – om ikke den mest omfattende, så i hvert fall blant de mest fullstendige, omfattende – og naturligvis først og fremst de mest troverdige.

I hvert fall kvantitativt konkurrerer esperanto-Wikipedia godt med flere av de nasjonalspråklige. For en måned siden lå den på 22. plass blant 271 språk, mellom de 31 språk som har over 100 000 artikler.

Nå er det over 128 000 artikler på esperanto, og antallet øker stadig.

Venos svisa prezidanto

Fine de septembro vizitos nin la (kun)prezidantino de la svisa E-asocio, Mireille Grosjean. Ŝi venos al Oslo por seminario okaze de la centjara jubileo de la atribuo de la Nobel-pacpremio al la Internacia Pacburoo en Ĝenevo, ĉar ankaŭ tie ŝi aktivas. Ni aranĝos almenaŭ unu membrokunvenon kun ŝi.

Eksterordinara ĝenerala kunveno lundon 15 marto 2010

El la protokolo

1. Ni aprobis la modifitan jarkalkulon 2009, kondiĉe ke la revizoro (ev. la vicrevizoro) ne havos rimarkigojn. Ĝi montras gajnon de 7 078 kronoj, kiu plejparte ŝuldiĝas al vendo de libroj el la malnova stoko de la Eldonejo kaj de subvencio de la domluo el la Eldoneja heredaĵo.

2. Ni finfaris la elektojn. La estraro 2010 - 2011 konsistas el:

Prezidanto: Kjell Peder Hoff (reelektita). <kjell.hoff[a]getmail.no>

Vicprezidanto: Cato Haugen (reelektita) <pluto8008[a]gmail.com>

Kasisto: Harald Rygg (reelektita) <hara-ryg[a]online.no>

Sekretario korespondanta: Douglas Draper (reelektita) <oficejo[a]esperanto.no>

Sekretario raportanta: Ida Brenna (nova) <idabrenna[a]gmail.com>

Anstataŭantoj: 1. Otto Prytz (ny). <pilotto[a]online.no>. Pretas partopreni en la estraro kiam ĝi alie ne estus decidipova.

2. Pepita de Caspary (reelektita) <pdecaspary[a]yahoo.no>

Revizoro: Terje Meier (reelektita) <t-meie[a]online.no>

Vicrevizoro: Erling Killingbergtrø (nova) <erling-k[a]online.no>

La elekto de reprezentantoj en la domkomisiono estas prokrastita. Ni ankoraŭ serĉas almenaŭ unu kandidaton. Estas dezirinde ke en la komisiono estu virino.

Ĉu antaŭ-/postkongreso en Oslo 2011?

La interesiĝantoj kunvenos post tri semajnoj por prijuĝi la eblojn. *De interesserte skal komme sammen om tre ukers tid for å se på mulighetene.*

Har du (litt) lagringsplass hjemme?

(Vi spør nok en gang.) Vi har i kjelleren her boklageret fra Forlaget, nå overtatt av klubben vår. Mye av dette er ikke ting som behøver å ligge akkurat her. Kan vi har det annet sted, vil det frigjøre plass som trengs til deler av Forbundets bibliotek, som snart må flyttes fra magasinet i Hamar bibliotek). Si fra til kontoret hvis du tror du har mulighet for å hjelpe.

La klubo vendas librojn, insignojn, glumarkojn

De Jon Rømmesmo (1923 – 2007) ni ankoraŭ havas *Om det internasjonale språket Esperanto* (2001) 48 p A5. 37 kr.

Kaj abundan stokon de la *Ŝlosilo (Nøkkel til esperanto)* kaj (norsk–esperanto) *Ordliste*. La nova prezo por ili ambaŭ estas 10 kr (sed 20 kr por 3; 50 kr por 10).

La malmole binditaj **vortaroj** norvega / Esperanto kostas ankoraŭ nur po 70 kr.

Fenomenet esperanto. William Auld. Norsk utgave 1987. 50 kr.

Lingvaj paĝoj el Norvega Esperantisto 1990 - 2005, kun artikoloj kaj desegnaĵoj de Johan Hammond Rosbach. 2009 116 p. 175 kr.

La klubo vendas ankaŭ **ruĝajn glumarkojn** (4 x 7 cm), kun la teksto:

ESPERANTO det internasjonale språket –
nøytralt – fredsfremmende – lettlært – kontaktskapende – [kaj la retadreso].

por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj.

Kaj insignojn / *jakkemerker* (verda stelo).

Gratulo

NI KORE GRATULAS nian veteranan sed ankoraŭ aktivan membron, Astrid Mansrud, pro ŝia 90-jariĝo sabaton 1. majo!

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

NI KUNVENAS la unuan kaj la trian lundojn de ĉiu monato, je la 19a horo. Tamen ne en la nacia tago, la 17a de majo. Kaj somere nur kiam venos gastoj.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).